FN PER ANC 47

ESPERANTO
# NORMANDA BULTENO
.unuiĝo de la normandaj esperantistoj
n°166
TRIMONATA BULTENO. BULLETIN TRIMESTRIEL.
de L'UNION des ESPERANTISTES de NORMANDIE:

DECEMBRO - 1989A - ( VINTRO 1989A - N°81A NOVA SERIO)

## La Grupo de Yvetot Nin Gastigis !

Pli ol tridek personoj partoprenis la Ĝeneralan Asembleon de nia Normanda Unuiĝo, okazinta la 8an de Oktobro. La grupo de Yvetot nin gastigis en urba ĉambro "Vieux Moulin" kie ni tagmanĝis en amika etoso. Eĉ de Norvegio samideanino alvenis : por babiladi en esperanto, ne gravas la kilometroj!!!

Probable pro la bongustaj mangaĵoj kaj la deziro pluigadi interkonatiĝajn diskutojn, iom malfrue komenciĝis la asembleo. Tamen, S-ro Pottier sukcesis nin arigi por diskuti pri nia asocio.

Ne kontestebla estas la fakto ke la normandanoj emas vojaĝi. Pluraj partoprenis internaciajn kongresojn. Tiun de U. E. A. en Brajtono, de SAT en Illertissen, de IFEF en Salou (Hispanio). S-ro Bessière iĝis la Prezidento de la Katolika Asocio. Jes ja, nia asocio vivas laù la ritmo de la tuta movado.


La bulteno regule aperos **komence de Decembro, Marto, Junio, Septembro.** Necesas ke vi sendu la aperontajn artikolojn sufiĉe frue por ke la redaktoro ilin tajpu kaj enpaĝigu.

Proksimume, 160 bultenojn oni sendas al la aliĝantoj, sed ankaù al enlandaj asocioj (16), kaj 8 eksterlanden. En 89, 14 novuloj la bultenon senpage ricevis. Ĉiu eldono kaj sendo de la bulteno kostas pli-malpli 600F00 (kontrolu la spezan raporton de Petro Kijo), bedaùrinde por 89 nur 41 personoj pagis sian kotizon. Se via nomo ne aperas en la ĉikuna nomaro de la pagintoj, bonvolu sendi vian kotizon, vi helpos la asocion por plenumi sian rolon, kaj daùre ricevos la bultenon. **Financoj devigas nin ĉesigi la sendadon de la bulteno al tiuj kiuj ne estas pagintaj sian kotizon.**

Neniu ŝango en la Komitato. Ni estos plu sub la (frateca) prezidenteco de S-ro Pottier. Sed alvoko estis lanĉita por ke novaj personoj komitataniĝu por alporti novajn ideojn, freŝan aeron en nian asocion. **Ni vin atendas** ! Partoprenu la komitatajn kunvenojn por kontribui al la vivigo de la asocio. Dankon.

...





(daŭrigo de la frontpaĝo)


Petro Lemarchand kaptis la atenton de la tuta ĉeestantaro kaj se ankoraŭ bezone pruvis sian kapablon tre pozitive labori por esperanto. Li alvokas por partopreno de la plej spertaj inter ni en starigo de grava kurso pere de nova medio. La projekto iom post iom maturiĝas, sed instigas nin al diskreteco por garantii plenan sukceson.

La venonta Ĝenerala Asembleo okazos iun semajfinon de Oktobro 90 en Herouville Saint Clair, apud Caen. Kontaktoj estos kun asocio "La kvinpetalo" (Bouresse) por samtempe organizi la duan **Normandan Rendevuon**. La unua en Rouen antaŭ 2 jaroj estis tre interesa kaj sukcesoplena.

Y. N.

**NOMARO DE LA PAGINTOJ POR 1989**

| | | | |
|---|---|---|---|
| BESSIERE | Albert | GUEROULT | Ginette |
| GUERRE | France | CARON | Sylvie |
| CHALM | Alain | GIBAUX | Jean |
| GIRAUD | Pierre | HUET | Maurice |
| JOURDAINE | Marie-Line | JOUVIN | Pierre |
| LANGOIS | Jacqueline | LEGRIX | Lucie |
| LEMARCHAND | Pierre-Maryse | LHERMITTE | Jacqueline |
| MORY | Paul-Denise | NOEL | Denise |
| PELTIER | Nelly | QUILLAUD | Pierre-Marie T. |
| SERY | Simone | | |
| | | | |
| ALLENO | Jacqueline | BLAISE | Marie Anne |
| HAULARD | Daniel | LEGRET | Alphonse |
| LEHERICEY | Michel | LELOGEAIS | Thierry |
| LEMAZURIER | Guy | LONGUET | Janine |
| MARTIN | Camille Madeleine | MAURICE | Andrée |
| NICOLAS | Yves | PAILLIER | Emma |
| QUILLET | Mauricette | ROCQUES | Georgette |
| TAILPIED | Alfred | | |
| | | | |
| CHARRON | Raphael(27) | GANDAIS | Pierre(27) |
| LEFEBVRE | Maurice(27) | | |
| POULAIN | Gunnel(27) | | |
| POUPINET | Simone(50) | | |
| CETAIRE | Michèle(28) | | |
| MICHAUD | Gisèle-Roger(60) | | |




*SENDU VIAJN KONTRIBUAĴOJN POR KE MEZE DE FEBRUARO NI EKTAJPU ILIN DANKON*



| ENSPEZOJ | | ELSPEZOJ | |
|---|---|---|---|
| Kotizoj | | Bulteno | |
| *- 1988 = 83 | | - n°163 = 557,50 | |
| - 1989 = 49........... | 2 635,00 | - n°164 = 558,40....... | 1 735,90 |
| | | - n°165 = 620,00 | |
| | | Propagando | |
| | | -bicikla karavano...... | 200,00 |
| | | Sekretario............ | 226,60 |
| | | SUME..... | 2 162,50 |
| Ce la poŝta konto la 28an de Nov. 1988... | 2 693,04 | Ce la poŝta konto la 12an de Sept. 1989.. | 3 165,54 |
| | 5 328,04 | | 5 328,04 |

*Ni registris por 1988 entute 83 kotizojn.



## *LA KASISTO INFORMAS*

*La partoprenintoj de la Ĝenerala Asembleo en Yvetot estis informitaj pri la kontoj de nia unuiĝo. Sed de tiam ni registris aliajn kotizojn kaj ni nun disponas (la 22an de Novembro 89) : 3710.54 FF.*

*Listo de personoj kiuj pagis sian 1989an kotizon inter la 1a de Septembro kaj la 16a de Oktobro :*

*Gesinjoroj : CETAIRE, LELOGEAIS, ANGENAULT, BONIOL, DESANLAC, PILINSKI, SAUNIER, CHEVALLIER, BOYER, POTTIER, DUHAMEL, BETTENCOURT, HIS, FERCOQ, LEBRUN, SAMSON.*

*PETRO KIJO*

*"ESPERANTO - NORMANDA BULTENO"*
*de L'Union des Espérantistes de Normandie*

*Minimuma kotizo : 45 Frankoj. ccp 283 40 H ROUEN*
*Sendu vian poŝtĉekon rekte al via CCP Centro*
*bankĉekon al : Pierre Quillaud*
*16, rue Lt Vaisseau Paris 76 120 Le Grand-Quevilly*

*Redaktas : Yves Nicolas 17-37 Quartier du Bois*
*14 200 Hérouville St Clair. Tel 31 95 11 81*

# VIRE

VIRE, mia urbo, situas je 60 kilmetroj sudokcidente de urbo CAEN. La fama "Mont Saint Michel" staras nur 70 kilometrojn sudokcidente.

Vire estas la ĉefurbo de pentrinda regiono "BOCAGE" kun multaj arboj, montetoj sufiĉe altaj de kiuj oni ofte ĝuas belajn panoramojn, kaj multaj riveretoj trutoriĉaj. La grundo konsistas el granito, skisto kaj sabloŝtono.


Dum la Centjara Milito, la Bocage-anoj konstante batalis kontraŭ la Angloj. Inter ili, estis Olivier BASSELIN, draplaboristo, verkisto de poeziaĵoj belstilaj titolitaj "VAUX (valoj) DE VIRE". Tiu nomo iom kripligita estas la origino de la nuna vorto "vaudeville", vodevilo.

En 1944, je la 6a de Junio, Vire estis ege bombardata, 90% detruita. Ĝi estis liberigita nur la 9an de Aŭgusto.

En Vire, krom Basselin pri kiu la fama usona poeto LONGFELLOW verkis belan poeziaĵon, naskiĝis poeto CHENEDOLLE, unu el la plej fruaj poetoj romantikaj, amiko de CHATEAUBRIAND kaj de Sinjorino de STAEL.

Vire estas nun moderna urbo kun plaĉe aspektaj domoj el blueta granito. Inter ili staras belaj monumentoj : Belfrido, Kirko, Muzeo. La apuda kamparo estas ĉarmoplena. En ĝi kuŝas vasta, artefarita akvejo "LA DATHEE".

En Vire oni povas ĝui bongustajn manĝaĵojn. La konata specialaĵo estas "ANDOUILLE" (anduj), fumaĵita tripkolbaso.



La verkisto René BAZIN skribis, ke Vire estas ĉarma loko de Francio. Por pliaj informoj bonvolu kontakti :

OFFICE MUNICIPAL DU TOURISME
Square de la Résistance
14 500 VIRE

A. LEGRET

---

**RUMANIO** Aperis en la lasta numero de "ESPERANTO", organo de U. E. A., emociiga artikolo de Rumana samideano pritraktanta la aĉajn kondiĉojn kiujn nuntempe travivas la esperantistaro de tiu lando.

Kvankam ne eksplicite malpermesata, la esperanto movado regule suferas pro diversnivelaj persekutoj fare de la agentoj de la sekurec-servo "Securitate". Oni akuzas ĝin en la lernejoj kiel "danĝeran religian sekton" aŭ internacian spionan organizaĵon". La jarlibroj ne plu atingas la delegitojn, aboni eksterlandajn revuojn ne eblas, ktp.

"La monda movado forlasis nin" diras la artikolo. UEA jam sendis oficialan protestleteron al Unuiĝantaj Nacioj. Sed ĉu sufiĉas ? Oni scias ke pluvero post pluvero fariĝas la riveroj, unuopaj esperantistoj povus kontakti la delegitojn de UEA en Rumanio por peti adresojn de tieaj samideanoj dezirantaj plumamikon. De ĉiam nia lingvo estas ilo por interpopola solidareco. Y. Nicolas

LA DANĜERA LINGVO Ulrich Lins mejloŝtona verko pri la historio de Esperanto.

# ROUEN SUB LA SUNA REĜO





S. BONIOL

*Urbo grava, interesoveka, nepre necesa por la pariza ekonomio ; urbo komerca, industria - ankaŭ administrema ; unu el la plej belaj en la reĝolando, el la plej riĉaj en Eŭropo, jen resume tiu impona provinca ĉefurbo, prestiĝan pasintecon jam ĝuanta.*

*En 1689 ĝi enkalkulas iom malpli ol 80 000 loĝantoj.*

*Laŭ ekonomia vidpunkto Rouen regas super sia tuta jam tre lerte organizita ĉirkaŭaĵo. La urbaj negocantoj laborigas multajn kamparajn familiojn, kiuj ŝpinadas kaj teksadas ne nur malglatajn drapopecojn, sed ankaŭ tolon el lino kaj kanabo, eksportotajn, ĉu al Nord-Ameriko -al la tiel nomata "Nov-Francujo"- ĉu al Hispanio, kiu siavice ilin transsendos al Sud-Ameriko. Sejno kaj aliaj du enlandaj vojoj rilatigas Rouen-on kun Parizo. Colbert (1619-1683) klopodos ilin plibonigi.*

*Laŭ administra vidpunkto, pri Rouen respondecas urbestro helpata de ses skabenoj. En la laborkonfliktoj -notindas la tiama maloftaĵo- la verdiktoj estas sufiĉe bone obeataj eble pro tio ke ne tro subpremaj ili montriĝas. Se en 1701 ununuran kontraŭincendian pumpilon la urbo disponas, (kvankam preskaŭ ĉiuj domoj estas konstruitaj el ligno), ĝi povas fieri pro 800 stratlanternoj. Tiuepoke, Parizo kiu kalkulas 500000 loĝantojn, estas nokte lumigata de jam 5000.*

*En 1681 Ĝenerala Hospitalo estas fondita kaj la taskon de sociala asistado prenas sur sin la urbaj aŭtoritatoj. Por iel reciproki la servon, la maljunuloj estas petataj balai la urbodoman korton, riveregajn kajojn kaj pontojn. En la tiel-nomata "Di-Hospitalo" la malriĉuloj estas senpage akceptataj kaj kuracataj ĝis 2 600, sed ili samlitas po du -eĉ po kvar dum la teruraj vintroj 1693 kaj 1694, spite la kontaĝajn riskojn, kiujn pro nescio oni preteratentas. Ve ! Kvarono de la 14000 tiutempe akceptitaj forpasos. Sed tie oni ankaŭ prizorgas la akuŝontajn virinojn kaj ĉiujare la novnaskitoj kalkuliĝas je proksimume 250.*

*Diversdevenaj estas la urbaj gravuloj : ĉu longdataj nobeloj, ĉu parlamentanoj (la talarporta elito), ĉu negocovigligantoj. Fine de la regado de Ludoviko la XIVa 21 %on % el la logantaro konsistigas tiaspeca patriciaro, dum 29 %ojn modestaj butikistoj, manlaboristoj kaj burĝoj malpli monhavaj. Se la malfreŝdataj nobeloj, posedantoj de luksegaj domoj, hezitadas inter unuarangeco en provinca ĉefurbo kaj enviata posteno ce la reĝa kortego, la freŝdataj prefere plifirmigas sian socialan statuson, ĉar pli gravas por ili profesiaj avantaĝoj, ol la kortegaj pompo kaj intrigo. Sed por atesti sian vervoran bonvolemon ili laŭlitere obeadas la reĝajn ordonojn kaj ne laciĝas en turmentado de la protestantoj.*

*La tiea reĝo de la negoco estas iu Thomas Legendre, ja tipa specimeno. Korespondantojn li havas tra la tuta mondo ; por li ĉio aĉeteblas kaj vendeblas : lano, drapo, aluno, sapo, grenoj, eĉ luksaĵetoj. Nobeligata en 1685 post konvertiĝo al katolikismo, li finance subtenas ŝip-ekipadon kaj estas unu el la plej gravaj ŝipkomercistoj en la tuta reĝolando. Car gravegas drap-eksportado kaj koton-importado : gravegas la haveno, kiu en 1699 kapablas enlasi 1 146 varsipojn. En 1694, lerta fabrikisto elpensis novan materialon, t. e. miksaĵo el kotonaj kaj silkaj fadenoj, kiun li nomis "siamaĵo".*

*Konklude plaĉe estas al mi liveri al miaj estimataj geleĝantoj informon, unuavide bagatelan, tamen signifoplenan kaj ĝojigan : el cent postmortaj inventaroj, minimume 40 mencias librokolekton.*

*Gratulindas la naskiĝloko de Corneille kaj Fontenelle.* ■

## 45-A SAT-AMIKARA KONGRESO




André Legros,
22, avenue Dumesnil, 93140 Bondy

YVETOT..YVETOT..YVETOT..YVETOT...YVETOT...

*Post la ferioj komenciĝis en la Junuldomo nova duagrada kurso kun 3 lernantoj. Ĝi okazas ĉiulunde de la 17a horo ĝis la 18a kaj duono.*

*Bedaŭrinde ne estas kurso por komencantoj.*

*La 8an de Oktobro oazis en "Salle du Vieux Moulin", la komuna tagmanĝo de la grupo, al kiuj estis invititaj ĉiuj Normandaj Esperantistoj. 39 personoj ĉeestis tiun feston, kaj post la manĝo okazis en la sama loko la Generala Kunveno de U. N. E..*

*La 27an de Novembro, je la 20 H 30 okazos en la Junuldomo la Generala Kunveno de la grupo.*

*Post la Ĝenerala Asembleo aperis interesan artikolon en "Paris-Normandie de la departemento Seine-Maritime.*


**L'Union des espérantistes de Normandie a tenu son assemblée générale**

HEROUVILLE..HEROUVILLE..HEROUVILLE..HEROU

*Kvar personoj ĉeestas la kurson por komencantoj, kaj 6 la duagradan. Tiuj kursoj okazas ĉiumarde de la 19 H30 ĝis 22 H 00. Ĉar li nun estas nia najbaro S-ro TAILPIED ofte helpas nin.*

*Ĵurnalistino de "OUEST-FRANCE" ĉeestis tutan kurson pri kiu ŝi tre pozitive raportis en longa artikolo aperinta en "Hérouville rubriko". Tri personoj telefonis por informiĝi, du pliaj sekvas la kurson.*





## UFE

**82a Franca Kongreso de Esperanto en Blois**

(de la 1-a ĝis la 5a de junio 1990)


Sinjoro Roger Pons
82ème Congrès
24 Mail Pierre Charlot
41000 Blois

Sinjorino Monique Collette Oudard, ano de la Kultura Asocio de la Fervojistoj de Caen, verkis poemaron kies titolo franclingve estas "Passions et Nostalgies". Antaŭnelonge la lernantoj de S-ro Angenault elektis poemon por ĝin traduki. La tradukon ni legu :

**LA MANOJ**

Infanmaneto je la ektagiĝo de l'vivo
Gracila kiel la birdo, dolĉa kiel la floro
Ci tenas en cia roza pugno la enigmon de cia koro
Kie jam estas difinitaj la sekretoj de cia vivo.

Manoj de la knabeto aŭ de la knabineto
Al la ludoj jam perfortaj, miksante la dolĉajn gestojn
Manoj ankoraŭ infanaj, pendiĝante al niaj koloj
Makulitaj per konfitaĵo aŭ per viola inko.



Manoj de la adoleskanto, longaj, virinecaj
Perfortaj kaj brutalaj, kelkfoje karesantaj
Viaj manoj estas birdoj iniciĝante al legoj niaj
Kiuj ofte provas imiti siajn plejaĝulojn.

Pri la manoj de la panjo, mi verkos poemon
Kiam ĉe sia koro, ŝi karesetas la infanon
Kaŭran en la dolĉeco de tiu akceptema nesto
Pri la manoj de la panjo, mi verkos poemon.

La manoj de du amantoj, de l'edzo, de virino
Estas revbirdoj kiuj siajn fingrojn miksas
Lernante ĉiu-tage tion, kion iafoje oni al si diras
De l'amant-manoj ni ne estingu l'ardon.

Belaj manoj de la maljunulo, je la fino de lia vivo
Faltoplenaj, pli beligitaj pro konstanta laboro
Vi ofertas per pia kaj konfidema gesto
La pokalon superfluantan pro plenumata vivo.

"Pasioj kaj nostalgioj"
Monique Collette Oudard
Esperantigis Sro Angenault kaj lernantoj.

---

**FRANCA ESPERANTO-INSTITUTO**


1) Sukcesis en <u>ATESTO PRI LERNADO</u>

BENOIT Louise (TB)
BURGOS Jean-Louis
DUBOIS André (B)
HORLAVILLE Marcel (SB)
KLEIN Thérèse (SB)
GONDOIN Sylva (SB)

2) Sukcesis en A.pri <u>PRAKTIKA LERNADO</u>

BENOIT Louise (SB)
BURGOS Jean-Louis
CONTE Marie-Thérèse (SB)

Gratulojn al la sukcesintoj kaj kursgvidantoj.
La direktorino de la ekzamencentro : JEANNINE VINCENT



# 1990   1990   1990

*Pro la abundaj informoj en tiu multpaĝa bulteno, frukto de la senĉesa laboro de niaj cent lokaj ĵurnalistoj, vi tutprobable ne estos atingintaj la dorsopagon antaŭ la finjaraj festoj ! Jes ja ĉu ne ?!*

*Nu, taŭgas tiuPage sendi al ĉiuj legantoj kaj anoj de nia normanda asocio,* ***la plej bonajn kaj sincerajn bondezirojn por la venonta jaro 1990.***

*Ĝi estu por ĉiuj jaro de bonfarto, okazo de fruktodonaj renkontoj, de vojaĝoj, de kiel eble plej ofta uzado de nia internacia lingvo.*
*Ĝi estu sukcesoplena por la esperanto movado kiu bezonas ĉiujn niajn fortojn por plenumi siajn taskojn, ene kaj eksteren.*

*Kiel kutime okazos multaj renkontoj internaciaj kaj naciaj, bonŝancaj estos inter ni tiuj kiuj povos ilin partopreni...kaj priraporti por nia bulteno.. Ni esperas ankaŭ ke ĉiuj ĉeestos tiun de nia regiona asocio, oktobre okazonta.*

***AL ĈIUJ FELIĈAN NOVJARON !!!***

---

**ABONOJ 1990 – Prezoj en francaj frankoj**

| | |
|---|---|
| Brita Esperantisto | 70 |
| Bulgara Esperantisto | 100 |
| Bulteno Internacia Muzeo Wien | 35 |
| Dia Regno | 65 |
| El Popola Ĉinio 1 jaro | 100 |
| 2 jaroj | 160 |
| 3 jaroj | 220 |
| Ekumenismo | 60 |
| Esperanto | 135 |
| Espéranto-Actualités (en français, pour 5 ans) | 160 |
| Esperanto-dokumentoj (serio de 10) du numeroj aperos en 1990 | 115 |
| Espero el Koreio | 75 |
| Espero Katolika | 95 |
| Fokuso (4 numeroj) | 75 |
| Fonto | 100 |
| Franca Esperantisto | 150 |
| Franca Katolika Esperantisto | 30 |
| Heroldo de Esperanto (16 numeroj jare) | 120 |
| (aerpoŝte) | 140 |
| Hungara Vivo | 100 |
| Israela Esperantisto | 75 |
| Kontakto | 70 |
| Kulturaj Kajeroj | 70 |
| La Juna Amiko (4 foje jare) | 26 |
| La Kancerkliniko (por 5 numeroj) | 100 |
| Lingvaj Problemoj kaj Lingvo-Planado | 150 |
| Literatura Foiro (6 numeroj) | 155 |
| Lit-aj N-roj de Franca Esperantisto po 3 | 60 |
| unu numero | 25 |
| MONATO (aerpoŝte) | 179/(220) |
| La Jaro (Poŝkalendaro de MONATO) | 22,50 |
| La Jaro (aerpoŝte) | 28 |
| Simpozio (filozofia) (2 numerojn jare) | 35 |
| Survoje | 110 |
| Verda Lupeo/Fenikso | 60 |



*Mendeblaj ĉe :*

*U . F . E .*
*4, bis rue de*
*la Cerisaie*

*75 004 PARIS*

*Nia amiko Claude ROUGET, iama Normando, kaj nun loĝanta en Norvegio, sukcesis aperigi esperanto-reklamon en la tre fame konata "Le guide du Routard" pri skandinavaj landoj. Gratulon !*

HEBERGEMENT GRATUIT
DANS LE MONDE ENTIER

900 hôtes répartis dans 58 pays
sont prêts à vous héberger
si vous parlez

ESPERANTO




* Salut ! on peut dormir chez vous ?
** Bien sûr ! Entrez !

SERVICE PASPORTA SERVO ,
J.E.F.O , 4 bis rue de la Cerisaie
75004 Paris

ET L'ESPERANTO C'EST AUSSI
-200 rencontres internationales de jeunes par an
-300 revues et livres édités chaque année
-du rock, de la BD, du théâtre ...

RENSEIGNEZ-VOUS AUPRES DE JEFO

La varbopaĝo en 'Le Guide du Routard' 1989